
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 23/12/2021 Kvincentsesdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 799,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 287,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 218,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 187,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 107,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**

**Sentoj dum atendado pri Kristnasko**



18/12/2014





Karaj Roger kaj ĉiuj ‚legantoj',

Mi sendas al vi

Kristnaskan Saluton.

Amike, Jan kaj Det Koning

(Nederlando)

**AE (Roger Springer) deziras ke miaj legantoj havu feliĉan, sekuran kaj sanan periodon.**





# **Volo Gueltling** mortis 13an de decembro dum lia **96a jaro.**

Mi kredas ke li naskiĝis en Germanujo kaj dum la dua mondmilito li estis en prizona loko pro tio ke li estis pacemulo.
Volo lernis Esperanton dum tiu periodo.



En Esperanto Domo mi ĉiam volis aŭskulti la perfektan kaj fluan Esperanton, kiun li parolis. Dum jaroj, li havis germanan aŭton.



1972



2010??

*Roger Springer*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 16a de decembro estis la tria sabato. Venis Roger, Chris kaj John *Roger Springer*

Amaso da preterpasintoj ĉe Manlia Plaĝo ariĝis pro la varma vetero, la rava mara venteto, la viglaj ondoj , la pitoreskaj bazaroj cele Krisnaskan butikumon . Tre ĝuinda sceno.

Sed kiuj de la vizitantoj surportis vizagamaskon? Preskaŭ neniu.
NSW malfermiĝas kvankam oni havas (je 18-a Decembro) pli ol du mil kazoj de la "Omicron" virusa vario. Kaj la kazoj kreskas rapide.

Roĝero konkludis ke kiel melkistinoj en la pasinteco, ne suferis variolon ĉar ili gajnis protektadon per havi bovvariolon. Simile, omicron estas la nuntempa bovvariolo kontraŭ severa Covid-19. ???

Eble. Mi daŭros uzi maskon.

*Chris Holliss*



# Reago al la plendo de Roger en AE 561

Mi tute kompatas Roger . Same kiel li , mi ne ŝatus la malaperigon de arbo, kiun mi plantis kaj prizorgis. Mi preferus la branĉojn de la arbo , ĝiajn foliojn ,eble florojn , kaj la vizitantajn birdojn al la tegmentoj de la apudaj domoj. Ankaŭ nia






najbaro, kiam li ekloĝis en sian domon , tranĉis la arbojn kaj starigis lignan barilon , kiun mi verde farbis por ke ĝi estu ne tiom ofendema .
Sed ĝardeno ĉiam estas surprizplena. Imagu kiel mi reagis , kiam mi trovis la ankoraŭ ne maturajn prunojn surtere!!!! Probable mi devus danki la kakatuojn

*Franciska Toubale*







## La Zamenhofan Feston ni festis en Ipswich je la 16.12. *Peter Danzer*






★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★




**3ZZZ** La elsendo de la 20a de decembro temas kompreneble pri Kristnasko tra la mondo , sed ankaŭ pri aktualaj problemoj kaj projektoj por bremsi la klimatŝanĝon Informas *Franciska Toubale*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Konfesu, ke armeoj estas grandegaj kontribuantoj al klimata kolapso, ke ili kaŭzas ĉiajn aliajn damaĝojn, kaj ke ili servas al neniu utila celo. *Mondo sen Militoj*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



Mi ŝatas la arbon, kiun mi plantis antaŭ 30 plus jaroj sur komuna tero de 4 domoj.

Grunda etaĝo.



Unu najbaro ne ŝatis la problemetojn kiujn ĝi kaŭzis kaj pagis por ĝia forhako sen konsulto kun mi.
Grunda etaĝo.


*Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 66 de "Por Komencantoj".




1). La vorto "kvar" estas "baza numeralo". Kio estas la vorto "kvara"?
2). Ĉu la vortoj "kvara k.t.p" povas ricevi la finaĵojn –j kaj –n?
3). Ĉu la bazaj numeraloj povas ricevi la finaĵojn –j kaj –n?
4). Ĉu ekzistas numerala adverbo kaj ĉu ekzistas numerala substantivo?
5). Ĉu la kernvorto de gramatika objekto povas ricevi la akuzativon?


Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 562.



# La plej bona donaco, kiun la Homaro donas al si mem.

## La homaro, en la lito, solvas la mondan plej grandan problemon.

The baby bust: How a declining birth rate will reshape the world - New Statesman




Komprenu ke ĉar virinoj povas nun mem elekti havi infanojn aŭ ne, dek naskiĝpovaj virinoj devas naski 21 infanojn por ne malpliigi la nombron da homoj en la mondo. Familioj nun elektas 1 aŭ 2 aŭ neniun infanon.

Antaŭe farmistoj bezonis multajn infanojn por helpi prizorgi la plantojn, bestojn, ktp por la vivo kaj ankaŭ zorgi la gepatrojn kiam ili maljuniĝos.

Nun urbanoj ne monprofitas per naski infanojn. La kosto por la subteno de ĉiu infano estas grandega. *Roger Springer*

Kiam la monda popolo duoniĝos, la valoro de la restantaj homoj pligrandiĝos kaj la necesaj laboroj nur estos konservanta laboro. Sed ni devos havi ian universalan pagon por subteni la tre valorajn homojn. La homaro estos kapabla solvi aliajn problemojn.

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



1). Ĝi estas "orda numeralo".
2). Jes.
3). Ne.
4). Jes, ambaŭ: kvare kaj kvaro.
5). Jes, ĝi devas ricevi la akuzativon se tio estas ebla: "La hundo manĝas la fiŝaĵon", sed "La hundo manĝas multe" (cetere evitinda!).

*Marcel Leereveld*.

# Forpaso de Volo Gueltling

Kara Jonathan kaj Roger




Mi estas tre malgoja, ke Volo ne plu vivas. Li estis tre speciala Esperantisto. Liaj Esperanto-gepatroj en Germanio decidis bapti lin kun la Esperanto-nomo Volo. Kvankam "Volo" bone sonas germanlingve, ĝi tute ne estas Germana nomo. Feliĉe la gepatroj povis konvinki la Germanaj instancoj ke li povas ricevi tiun nomon. Tiel li certe estis la sola Germano kun tiu antaŭnomo.


Volo multe helpis min kiam mi unue alvenis al Sidnejo. Li akceptis min ĉe la flughaveno, kaj li ŝoforis min per sia tre malnova Volkswagen Käfer ("skarabo") al la diversaj vidindaĵoj ĉirkaŭ Sidnejo. Ankaŭ li helpis min traduki diversajn tekstojn de la Germana al Esperanto.

Dankon Volo!

Bildoj:
1) Volo kiam li montris al mi Warragamba Dam en 2005.
2) Volo, Rainer kaj la Volkswagen dum vizito en Leura en la Blua Montaro.



*Rainer Kurz*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# Ĉe la morto de Volo Gueltling .

**ESPERANTOPLENA VIVO.**

Mi unue renkontis Volon en Hamburgo, Germanujo, en la unua jaro post la milito. Li estis junulo, kaj kun aliaj hamburgaj esperantistoj vizitis la centran fervojstacidomon por saluti la multajn nederlandajn kaj aliajn esperantistojn kiuj vojaĝis vagonare el Nederlando al la kongreso de S.A.T. en la urbo Aarhus en norda Jutlando en Danujo. Normale la nederlandanoj vojaĝus el de Holando al Danujo per biciklo, dum du tagoj. Sed ĵus post la fino de la milito Germanujo estis ankoraŭ militiste okupata, de Usono en la oriento, Francujo en la sudo, kaj Britujo en la nordokcidento. La brita armeo tiutempe ne permesis al eksterlandanoj vojaĝi bicikle tra Germanujo, nur vagonare. La esperantistoj do devis enmeti siajn biciklojn en vagonaron kaj ĉe la dana limo elpreni siajn biciklojn por iri al norda Jutlando, dum la vagonaro pluvojaĝis al Kopenhago. Ĉar tiu vagonaro haltis kelkajn horojn en la ĉefstacidomo de Hamburgo, la tieaj esperantistoj ricevis la permeson suriri sur la peronon por tra la fenestretoj saluti la esperantistojn, kaj ili ne rajtis eniri la vagonojn. La holandaj k.t.p. esperantistoj ne rajtis eliri la vagonojn, nek tra la fenestretoj doni ion ajn al la germanoj, speciale ne manĝaĵojn, ĉar por senti ke ili perdis la militon ili rajtis ricevi nur malgrandan racionon da manĝaĵo. Mi tamen eliris por fari fotojn de la hamburgaj esperantistoj, inkluzive de Volo Gueltling. Sed ni ne kapablis donaci manĝaĵon al la germanoj, kiuj certe malsatis. Kvin jarojn poste mi migris al Aŭstralio kaj en AEA-kongreso surpriziĝis renkonti Volon, kiu jam antaŭe ankaŭ estis migranta el Eŭropo. Post tio ni regule renkontiĝis en AEA-kongresoj. Dum sia tuta vivo li estis daŭra laboranto por Esperanto. Ni ambaŭ estis membroj de SAT kaj dum certaj periodoj ni estis SAT-Perantoj. Ni krome estis politikaj amikoj. Unu fojon mia edzino kaj mi vizitis lin en lia loĝejo, sed ĉar ni venis senaverte, ni devis konversacii sidante sur la ŝtuparo. Ni ne plu interrilatis kiam Igor permesis al kelkaj virinoj uzi multege da AEA-mono por senvaloraj elspezoj.

Honoron al la ofte tre utila laboro de Volo por Esperanto kaj por A.E.A.

*Marcel Leereveld*.





